# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



PLENUMITA 27/06/2024 sescentnaŭdektria eldono (unua eldono 26/09/2011)



**Subtenu vian Novaĵleteron**

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;



**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

## Esperanta Retradio klaku la bluajn vortojn



Donas bonan Ĉirkau -5 minutan aŭskultadon kaj legadon Ĉiun tagon

Ne estas facila elekti el la ĉiuj tagaj programoj Do aŭskultu ĉiujn.

**OMEGA-3-GRASACIDOJ POVUS REDUKTI AGRESEMON** KLAKU LA BLUAJN VORTOJN

22 DE JUNIO 2024 (*ROGER SPRINGER*)

# Dankon, Karlo



Sabaton la 22an de junio 2024 melburnaj esperantistoj kuniĝis por danki Karlon, kiu dum dek sep jaroj - de januaro 2006 ĝis septembro 2023 - senlace helpis en la teamo kiu ĉiun lundon elsendas elsendon en Eperanto en la radio 3ZZZ . Ni kune manĝis en la restoracio de la centro de la urbo Young and Jackson, fama pro la nuda pentraĵo de Chloé, kiu pendas tie ekde 1909. Ĝi estas la verko de franca pentristo Jules Joseph Lefebvre, estis montrita unue en Parizo en 1875 kaj poste ricevis medalojn en 1879 en Sidnejo kaj en 1880 en Melburno.


Foto maldekstra flanko : Peter kaj Joanne Johns, Bernie Heinze

dekstra flanko: Karlo Egger, Heather Heldzingen, Franciska Toubale kaj Nicholas

fotisto: Esther Parris Raportas *Franciska Toubale*






# Babilado en Kabulturo

Lastan semajnon BES membroj renkontiĝis ĉe la hejmo de Petro kaj Linda Danzer por babilado kunveno. Ili ankaŭ legis el la centjara libro "Literatura mondo " kaj vizitis la belajn ĝardenojn ĉirkaŭ la domo.



Petro Danzer



Linda Danzer



## 3ZZZ

En la elsendo de la 24a de junio troviĝas informoj pri Esperantujo: mesaĝo de UEA okaze de la tago de la rifuĝintoj kaj portreto de Hori Jasuo, pri la historio de Afriko, pri la sonpejzaĵo de la naturo ,kiun homoj ne kapablas tute aŭdi ,kaj pri la anksia generacio

*Franciska Toubale*

## VIZITO DE AŬSTRIA ESPERANTISTO

Nuntempe, Ewald Schick, esperantisto el Aŭstrio vizitas Aŭstralion,
Post semajno en Melburno kaj semajno en Sudaŭstralio, li nun esploras
Sidnejon 20-a de junio > 1-a de julio
Brisbanon 1-a > 4-a de julio
Cairns 4-a > 8-a de julio
Aŭklandon 9-a > 14-a de julio

Jen intervjuo kun li (de Franciska) ĉe nia radiostacio 3ZZZ,

Se vi volas gastigi aŭ simple renkonti lin, kontaktu lin rekte +61 494 151556 vulpoa@gmail.com


*Sandor Horvath*



**AEA monata prelegserio**

**Dimanĉo,**
**la 21-a de julio 2024**
**17:00 Sidneja tempo**

Skribu al
prezidanto@aea.esperanto.org.au
por akiri la Zoom ligilon




## Javier Romero TELLO *(Hispanio)*

# LA ETERNA MONDBILDO DE MARTINUS KAJ ESPERANTO

**Per la prezentado, la aŭskultantoj povos ekkoni, kiu estis Martinus, kio okazis en lia vivo por akiri kosman konscion kaj kion li antaŭvidis rilate al la estonta mondŝtato kaj la estonta mondlingvo, Esperanto**

# El Adelajdo



Kun kelkaj adelajdaj esperantistoj ĉe la Centra Bazaro


Rundle Mall - Adelajdo



Mambray Creek


Port Germein




# La Verda Stelo



La Verda Stelo estis unue proponita en iu artikolo de 'La Esperantisto' en 1892 por uzo kiel simbolo de reciproka rekono inter esperantistoj.

Dum jaroj, ĉiu sciis, ke esperantisto identigas unu la alian per la malgranda verda stelo kiun ili portas. Nun la plej multaj Esperanto-parolantoj ne plu portas tiujn pinglojn. Kial ne?

*Roger Springer*